
# Aŭstraliaj Esperantistoj



## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 17/11/2022 Sescentnaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**


Alternativaj Novaĵoj https://www.greenvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 683,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **300,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **153,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **139,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018

Nun studas **92,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



Donas bonan ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon

**Paroli al nekonatoj povas feliĉigi la homon**

11-A DE NOVEMBRO 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*

# El Adelajdo







La 12-an de novembro okazis en la hejmo de Trevor kaj Katja Steele kviza posttagmezo.

Ĉeestis 15 homoj. Kun abundo de interesaj kvizaj demandoj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj oni bone amuziĝis kaj ĝuis la kunestadon. *Katja Steele*





# Skribu pri via klubo



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ DE LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).** **N.ro 12 de "Por Komencantoj".**

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ**: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En "Li manĝis la tutan torton, kiu estis por ĉiuj", la frazo "kiu estis por ĉiuj" nomiĝas "SUBFRAZO(= SUBORDA FRAZO) ĈE LA OBJEKTO DE LA ĈEFFRAZO (= ĉefpropozicio)".
Kiu estas tiu objekto?

2). Subfrazo, kiu mem devas havi subjekton kaj predikaton (verbon) kaj povas havi objekton kaj adjektojn, plej ofte donas pliajn informojn pri la kernvorto de subjekto, objekto, aŭ adjekto.
La subfrazo do plej ofte agas kiel adjektivo, ekz. "....... la floro, KIU ESTAS RUĜA", similas al "..... la floro ruĝa = la RUĜA floro". Kiu vorto en la subfrazo ripetas la vorton "floro" en la ĉeffrazo"?

3). Propozicio (= frazo) havas du aŭ tri aŭ kvar frazpartojn: necesajn subjekton kaj predikaton, kaj eventualajn objekton kaj adjektojn. En la frazo "Li ĉiam estis fidela amiko" troviĝas kiom da tiuj frazpartoj, kaj kiuj?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 609.

*Marcel Leereveld*



**3ZZZ** En la elsendo de la 14a de novembro vi trovos informojn pri la movado, pripensojn pri la morto kaj respekto au nerespekto al la naturo.




*Franciska Touvale*

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1). la tutan torton.
2). "kiu".
3). a). 3.
b). "Li" (= subjekto); "ĉiam" (= adjekto); "estis fidela amiko" (= predikato).

*Marcel Leereveld*.



# Skribu pri via klubo



# La politiko de la mondo ŝanĝiĝas

*Roger Springer*

http://thesaker.is https://www.greanvillepost.com/
http://www.globaltimes.cn/index.html https://sputniknews.com/


Mi ne enmetas ligojn al la kapitalista mondo ĉar la ĉiutaga medio bone informas vin pri tio.




Kara Roger,
jen adreso, kiun ankaŭ indas publikigi:
http://neniammilitointerni.over-blog.com/2022/11/kontrau-la-rusia-imperiismo-artikolo-aperita-en-sennaciulo-n-03-04-de-marto/aprilo-2022.html



Amike, *Peter Weide*






Ĉu vi rigardas pentraĵon de Monet ?

Ne!


Linda kaj Petro, membroj de BES, nur ĝuis reflektojn en loka lageto en la centro de *Caboolture*

( origina nomo = "Kabul- Tur";
loko de "tapiŝo- pitono" )?

*Peter Danzer*



Jen monda novaĵ-akaparo, se vi deziras, por legantoj de *AŬSTRALIAJ ESPERANTISTOJ*, kiu antaŭas grandan anoncon aperontan baldaŭ en famaj periodaĵoj de Esperantujo. Martin Schäffer * antaŭ nelonge aprobis ĉi tiun duonpaĝan anoncon kaj artaĵon por la decembra eldono de ESPERANTO: (paĝo 2 vidu venontan semajnon)




## *La puno por hipokrituloj (tranĉado de karno), persa miniaturo*

* https://eo.wikipedia.org/wiki/Martin_Sch%C3%A4ffer

Jen la eta teksto kune kun la titolo de la koncerna eseo, mia retadreso kaj la dulingva ligilo:

Nescieco de juneco afliktas nin ĉiujn de tempo al tempo, ĉu ne? Tio tamen en plenaĝeco fariĝas tute neakceptebla ĉe bahaano ĉar la plej supera principo de la Bahaa Kredo estas, ke oni memstare esploru la veron por si mem en nia religio, kies gvidantoj estas demokratie elektitaj laikoj. Kaj do, **bonvolu helpi min en 2023 Esperantigi 1000 junajn bahaajn plenkreskulojn en 100 landoj** ĉar novaj lernadoj demonstras, kaj eĉ per dedukta rezonado pruvas, ke Baha'u'llah antaŭenigis Esperanton jam en 1890. 😀

***HIPOKRITECO EN RELIGIO - KIAL?*** Tute nova dulingva eseo de *pauljdesailly@gmail.com* https://www.bandeeducation.com/hypocrisy-in-religion



*Paul Desailly*